En la mezurbo troviĝas ankaŭ aliaj rimarkindaj memoraĵoj: la belega preĝejo de Dominikanoj, laŭ gota stilo, kaj la preĝejo de Franciskanoj, kun rimarkindaj vitraĵoj de la pola poeto kaj pentristo Wyspianski; universitato, la muzeo de princoj Czartoryski; la urba teatro, kun la rava kurteno de Siemiradzki kaj starigita en la jaro 1910, dank' al oferemo de mondkonata virtuozo Paderewski; grandega monumento de la pola reĝo Wladislavo Jagiello; poste la tre bone konservitaj mezepokaj fortikaĵoj kiel la pordego de Sta Floriano, dikegaj muroj kun turoj kaj bastionoj kaj ekstreme vidinda „Barbakano“, vere unika fortikigita konstruaĵo el la 15a jarcento.

Plue en la mezurbo troviĝas la monteto „Wawel“, sur kiu sin etendas la antikva mezepoka reĝa kastelo kaj la katedralo. La kastelo, antaŭ kolkdeko da jaroj aliigita de la aŭstria registaro je kazerno, estis terure difektita de soldatoj kaj nur nuntempe, kiam la militistaro post longaj klopodoj de l' pola nacio definitive forlasis la kastelon, oni komencis ĝin fundamente renovigadi, por restarigi ĝian antaŭan brilecon.

La katedralo posedas multenombrajn memoraĵojn, monumentojn, tombojn, kaj prave ĝi estas konsiderata kiel „Pola Pantéono“. Ĝi posedas interalie la arĝentan sarkofagon de Sta Stanislavo, la tombojn de Adamo Mickiewicz kaj de polaj reĝoj kaj herooj. Inter la tomboj kaj monu-



mentoj troviĝas multaj verkoj de famaj skulptistoj, inter aliaj kelkaj de Veit Stoss kaj Thorwaldsen.

El la antaŭurbaj kvartaloj meritas atenton la hebrea kvartalo „Kazimierz“. Vere ĝi tute ne estas bela, sed ĝi posedas interesajn mezepokajn preĝejojn: Kristkorpo, Sta. Katarino, kaj Sta Miĥaelo, kun tomboj de meritplenaj polaj viroj.

Apud la urbo troviĝas artefarita termonteto de Kosciuszko, de kiu oni vidas belegan panoramon, atingantan ĝis la Tatra. Oni vidas de tie la arbarojn: „Panienskie Skaly“ (Virgulinaj Rokoj) kaj Bielany kaj iom pli malproksime „Tyniec“, kun ruinoj de tre antikva Benediktina monaĥejo, kiu estis iatempe la plej fama en Polujo.

En la pli malproksima ĉirkaŭaĵo troviĝas la urbeto Wieliczka, posedanta la mondfamajn salminejojn. Tie la multenombraj subteraj galerioj, koridoroj kaj kameroj formas veran labirinton.

Tre rekomendinde estas, de Krakovo fari per fervojo pli malproksiman ekskurson al Zakopane, fame konata aerkuracloko, kiu kuŝas apud la deklivoj de la montaroj Tatra, apartenantaj post la Alpoj al la plej altaj kaj plej belaj rokaj montoj en centra Eŭropo.

## La Fundamento.

„Por ke lingvo internacia povu bone kaj regule progresadi kaj por ke ĝi havu plenan certecon, ke ĝi neniam disfalos kaj ia facilanima paŝo de ĝiaj amikoj estontaj ne detruos la laborojn de ĝiaj amikoj estintaj, estas plej necesa antaŭ ĉio unu kondiĉo:

**La ekzistado de klare difinita, neniam tuŝebla kaj neniam ŝanĝebla Fundamento de la lingvo.**

Kiam nia lingvo estos oficiale akceptita de la registaroj de la plej ĉefaj regnoj kaj tiuj ĉi registaroj per speciala leĝo garantios al Esperanto tute certan vivon kaj uzatecon kaj plenan sendanĝerecon kontraŭ ĉiuj personaj kapricoj aŭ disputoj, tiam aŭtoritata komitato, interkonsente elektita de tiuj registaroj,

havos la rajton fari en la fundamento de la lingvo unu fojon por ĉiam ĉiujn deziritajn ŝanĝojn, se tiaj ŝanĝoj montriĝos necesaj; sed ĝis tiu tempo la fundamento de Esperanto devas plej severe resti absolute sensanĝa, ĉar severa netuŝebleco de nia fundamento estas la plej grava kaŭzo de nia ĝisnuna progresado kaj la plej grava kondiĉo por nia regula kaj paca progresado estonta. Neniu persono kaj neniu societo devas havi la rajton arbitre fari en nia Fundamento iun eĉ plej malgrandan ŝanĝon!“ — —

„Laŭ silenta interkonsento de ĉiuj esperantistoj jam de tre longa tempo la sekvantaj tri verkoj estas rigardataj kiel fundamento de Esperanto:

- |                            |   |                         |
|----------------------------|---|-------------------------|
| 1. La 16-regula Gramatiko; | } | La Fundamento de        |
| 2. La Universala Vortaro;  |   | Esperanto.              |
| 3. La Ekzercaro.           |   | Eldonejo                |
|                            |   | Hachette & Cie., Paris. |

Tiujn ĉi tri verkojn la aŭtoro de Esperanto rigardadis ĉiam kiel leĝojn por li, kaj malgraŭ oftaj tentoj kaj delogoj, li neniam permesis al si eĉ la plej malgrandan pekon kontraŭ tiuj ĉi leĝoj; li esperas, ke pro la bono de nia afero ankaŭ ĉiuj aliaj esperantistoj ĉiam rigardados tiujn ĉi tri verkojn kiel la solan leĝan kaj netuŝeblan fundamenton de Esperanto.“

Pro la graveco de la „Fundamento“, laŭ nia opinio ĉiu vera Esperantisto devas posedi la verkon; ankaŭ la „Fundamentan Krestomation“ oni ne forgesu aĉeti kaj atente tralegi.

## Esperantista Centra Oficejo.

Laŭ komuniko de Dro Zamenhof, skribita la 1an de Marto 1906, „la Centra Oficejo ne estas ia leĝdonanta komitato, ĝi estas simple oficejo, ĝi estas simple loko, en kiu koncentriĝas la laboroj de la du komitatoj, kreitaj de la Bulonja Kongreso. La Kongreso kreis provizoran Lingvan Komitaton

kaj provizoran Organizan Komitaton, sed ĝi donis neniajn monajn rimedojn, por ebligi al ambaŭ komitatoj sukcesan laboradon; tiam troviĝis sindonaj kaj malavaraj Esperantistoj, kiuj el sia propra poŝo donis (almenaŭ por la unua tempo) la necesan monon, luis apartan loĝejon, en kiu povus koncentriĝi la laboroj de ambaŭ komitatoj, ĉiuj dokumentoj, ĉiuj leteroj, irantaj al la diritaj komitatoj kaj de la komitatoj; ili ankaŭ difinis kelkan salajron por aparta sekretario, kiŭ — kun konsento de la prezidantoj de ambaŭ komitatoj — devas plenumadi la necesan korespondadon, registradon k. t. p. Sekve la Centra Oficejo estas ne ia memstara leĝdonanta institucio, sed nur simple helpa oficejo por ambaŭ komitatoj kreitaj de la Kongreso.“

La sidejo de la Centra Oficejo estas: 51, rue de Clichy, Paris. Ĝia tasko estas antaŭ ĉio:

1. Doni sciigojn pri la demandoj, kiuj rilatas la subtenadon kaj propagandon de Esperanto, al societoj, grupoj aŭ personoj, kiuj sin interesas pri tio, kaj faciligi rilatojn inter ili;

2. Prepari la studadon de la demandoj, kiuj povus esti enmetataj en la programon de la kongresoj, konferencoj aŭ aliaj kunvenoj, kiuj deziras uzi la servon de la Oficejo; plue helpi la komitatojn de tiuj kunvenoj, koncerne la kunvokojn kaj komunikon

3. Helpi kaj partopreni, se tio konvenas, la efektivigon de la decidoj de tiuj kongresoj, konferencoj aŭ kunvenoj;

4. Klasigi kaj konservi la arĥivojn de tiuj kunvenoj, ĉiujn dokumentojn, kiuj povas esti konfidataj al la Oficejo, kaj ĉion, kio povas interesi la esperantan movadon;

5. Organizati bibliotekon enhavantan ĉiujn verkojn en Esperanto kaj pri Esperanto, kolektante ankaŭ, laŭ eblo, la artikolojn el gazetoj kaj revuoj, kaj la verkojn rilatajn al demandoj interesaj por Esperantismo;

6. Kolekti ĉiujn sciigojn statistikajn kaj aliajn, kiuj koncernas la diskonigon kaj la utiligon de Esperanto;

7. Starigi kaj plenigi ĉiutage bibliografion de la verkoj en Esperanto kaj pri Esperanto.

## Lingva Komitato.

Jam en la dua kunsido de la Unua Kongreso Universala de Esperanto (Boulogne-sur-Mer, 1905) oni preparolis la starigon de „Lingva Komitato“. La prezidanto demandis la kongreson, „ĉu ĝi konsentas pri la fondo de komitato simple lingva kun Doktoro Zamenhof kiel prezidanto, por konsiliĝi kun li pri ĉiuj demandoj rilataj al la lingvo“. Tiu ĉi propono estis aprobata kaj en la kvara kunsido oni elektis la unuajn anojn por la provizora Lingva Komitato, kies prezidanto fariĝis S-ro Boirac, la rektoro de la franca universitato Dijon. Dum la Dua Universala Kongreso (Genève 1906, en la tria kunsido) la provizora komitato estis definitive aprobata.

La tasko de la Lingva Komitato estas: „zorgi pri la konservado de la fundamentaj principoj de la lingvo kaj kontroli ĝian evoluon. Ĝi do esploras ĉiujn lingvajn demandojn kaj solvas ilin laŭ la supre diritaj principoj. Neniel la Fundamento nek la Lingva Komitato povas esti baro por la normala evoluo de a lingvo, kiun ili, kontraŭe, certigas.“

La sidejo de la Lingva Komitato estas en Paris; adreso: Esperantista Centra Oficejo, 51, rue de Clichy, Paris.

La nombro de la Lingvokomitatoj ne estas limigita; nuntempe proksimume 150 personoj apartenas al la komitato.

Pri la elekto de novaj komitatanoj kaj pri la daŭro de la mandato informas la artikoloj 3 kaj 4 de la Regularo de la Lingva Komitato. Jen la laŭvorta teksto:

Art. 3a. La Komitato varbiĝos balote, per la voĉdonado de jam enestantaj anoj, per listoj de proponoj, preparitaj de la Estraro laŭ la petoj al ĝi adresitaj de la diverslandaj esperantistoj.

Art. 4a. La Lingvokomitatoj tiel elektitaj konservos siajn funkciojn sen templimo, escepte se ili propravole eksiĝos. Estos rigardataj kiel eksiĝintaj la anoj, kiuj restis pli ol ses monatojn, ne respondante la demandojn aŭ leterojn al ili adresitajn.

## Akademio.

En la jaro 1908 dum la Kvara Universala Kongreso de Esperanto oni starigis en la Lingva Komitato „Superan Komision aŭ Esperantistan Akademion, difinitan por esplori la demandojn submetitajn al la L. K., kaj formuli decidojn laŭ la opinioj kolektitaj pri tiuj demandoj ĉe la Lingvokomitatoj“.

La Akademio esploras laŭ la regularo de la 12a de Junio 1908:

- „a) La demandojn, kiujn ĝi elektis per propra iniciato;
- „b) Ĉiujn demandojn prezentitajn al ĝi per favora raporto subskribita de almenaŭ kvin membroj de la Lingva Komitato.“

„Por esplori specialajn demandojn, la Akademio povos starigi specialajn konsiliĝajn komisiojn, kiuj povos enhavi kiujn ajn membrojn de la Lingva Komitato, aŭ eĉ personojn ne apartenantajn al tiu lasta.“

La nombro de la membroj de la Akademio ne estu, laŭ la regularo, pli granda ol 18. La Akademianoj estas elektotaj, per absoluta plimulto de la Lingvokomitatoj „laŭ proponlistoj enhavantaj nombron da kandidatoj ĉirkaŭe duoblan de la elektotaj. La kandidatoj estas elektotaj de la Estraro inter la membroj signitaj pro speciala lingvistika kompetenteco, prezentitaj de la diverslandaj esperantistoj, kaj havantaj la eblecon doni efektivan kunhelpon al la laborado de la Komitato.“

„La membroj de la Akademio estas elektitaj por naŭ jaroj kaj rebalototaj ĉiun trian jaron po triono. Ili estas reelekteblaj.“

Pri la decidoj diras la 13a artikolo de la regularo:

„La decidoj alprenitaj de la Akademio estas konigitaj al la membroj de la Lingva Komitato, por konsulto.

„Oni publikigos ilin, kaj ili ricevos leĝforton nur, se tri monatojn post tiu konigo ili ne estos malaprobitaj de pli ol unu triono de la Lingva Komitato.

„Se, post la diritaj tri monatoj, pli ol unu triono de la Lingva Komitato malaprobis tian decidon, ĝi estas denove pridiskutota de la Akademio, kaj la finan decidon faros la Lingva Komitato per plimulto de voĉoj.“

La Lingva Komitato kaj la Akademio havas la saman estraron:

Honora prezidanto: Dro L. L. Zamenhof, 9, ul. Dzika, Warszawa, Rusujo.

Prezidanto: Rektoro E. Boirac, 2, rue Crébillon, Dijon, Francujo.

Vicprezidantoj: Dro K. Bein, 23, Smolna, Warszawa, Rusujo. Dro E. Mys, Marktstr. 68, Altona a. E., Germanujo.

Por specialaj demandoj oni starigis specialajn komisionojn:

Komisiono por Gramatiko (direktoro: A. Grabowski, Hoza 40, Warszawa, Rusujo).

Komisiono por Komuna Vortaro (direktoro: Profesoro Th. Cart, 12, rue Soufflot, Paris).

Komisiono por Teknika Vortaro (direktoro: Profesoro René de Saussure, 8, rue Bovy-Lysberg, Genève, Svisujo).

Kvaran Komision, tiun por Internaj Aferoj, oni nun forigis.

Nuntempe la Akademio konsistas el 14 Lingvokomitatoj.

Ĉiujn komunikojn por la Akademio oni adresu al la Sekretariejo de la Akademio, 51, rue de Clichy, Paris.

## Konstanta Komitato de la Kongresoj.

En la kvara kunsido de la Unua Universala Kongreso de Esperanto (Boulogne-sur-Mer, 1905) oni decidis, ke la Komitato, kiu organizos la venontan kongreson, konsistos el la estraro de la unua kongreso. „Tiu ĉi Organiza Komitato ankaŭ esploris la diversajn demandojn resenditajn, prokrastitajn aŭ ne esploritajn en la unua Kongreso, kaj prezentos raportojn al la venonta kongreso.“

Prezidanto de tiu ĉi Organiza Komitato fariĝis la franca generalo Sebert. La sidejo de la Komitato estas la Esperantista Centra Oficejo, 51, rue de Clichy, Paris.

La provizora Organiza Komitato proponis al la Dua Kongreso (Genève 1906), krei Konstantan Komitaton de la Kongresoj, konsistontan el: Internacia Organiza Komitato, elektita de ĉiu kongreso por prepari la sekvontan, Loka Komitato kaj konstanta Ĝenerala Sekretariejo de la Kongresoj, kiun disponos la Organiza Komitato, kaj kiu sidos provizore ĉe la Esperantista Centra Oficejo.

Dum la Kvara Kongreso oni reorganizis la Konstantan Komitaton kaj decidis la jenon:

„La Organiza Komitato estos ĉiujare aŭtomate formita, laŭ la sekvanta maniero: Ĝi enhavas kiel membrojn:

1. Du anojn de la Komitato de la antaŭa kongreso;
2. Du anojn de la Komitato de la nuna kongreso;
3. Du anojn elektitajn por ĉiu kongreso decidita por la venonta jaro;
4. Unu prezidanton (kaj se necese unu vicprezidanton) senpere elektitajn de la kongreso mem;
5. Unu ĝeneralan sekretarion, same elektitan de la kongreso kun la nombro necesa de sekretarioj adjunktaj, almenaŭ unu por Eŭropo kaj unu por ĉiu alia kontinento, kie okazos kongreso.“

La tasko de la Konstanta Komitato estas la jena: Ĝi „estas komisiita decidi la ĝeneralajn pre-  
parojn rilatajn al la kongreso, nome: fiksi la pagotan  
kotizaĵon, prepari la provizoran tagordon, fari la ofici-  
alajn internaciajn klopodojn.“

## Internacia Reprézentantaro.

La Kvina Universala Kongreso en Barcelona decidis pri Internacia Reprézentantaro:

1. Estu fondita, aparte de la Lingva Komitato kaj de la Konstanta Komitato de la Kongresoj, Administra Reprézentantaro de la propagandaj societoj, por oficiale reprezenti la Esperantistajn propagandajn societojn en ĝeneralaj okazoj, kaj zorgi pri la funkciado de la Oficialaj Institucioj de Esperanto.

2. Tiu reprézentantaro estu elektita de la diversaj propagandaj societoj de Esperanto, proporcie je ilia multmembreco, po unu delegito por mil Esperantistoj, laŭ metodo difinota de la unua Reprézentantaro.

3. La unua tasko de tiu Reprézentantaro estu starigi specialan regularon por finance subteni la Oficialajn Instituciojn de Esperanto.

4. La unua Reprézentantaro estu elektita laŭ provizora regularo difinita de la Konstanta Komitato de la Kongresoj.

La Sepa Universala Kongreso en Antwerpen decidis:

Estas dezirindaj:

1. Ĝenerala organizaĵo por doni firman bazon al la oficialaj jam ekzistantaj institucioj, kaj por ilin subteni kaj interligi.

2. Unuiĝo de la naciaj esperantistaj societoj.

3. Amikaj kaj efikaj interrilatoj inter la propagandaj kaj la specialaj, fakaj aŭ aplikaj societoj, kiel ekz. U. E. A.

La kongreso elektis komision por studi la tutan demandon kaj prezenti, dum la Oka Kongreso, al la delegitoj planon por efektivigo de tiuj deziroj.



## Kongresa regularo.

### I. Konsisto de la Kongreso.

#### 1.

En la Universala Kongreso de Esperanto povas partopreni „ĉiu persono, kiu scias kaj uzas la lingvon Esperanto, tute egale por kiaj celoj li ĝin uzas“<sup>1)</sup>, kondiĉe ke tiu persono:

a) sendis sian aliĝon, ĉu antaŭ la Kongreso al la Loka Komitato, ĉu dum la Kongreso al la Kongresa Sekretariejo;

b) pagis la kotizaĵon, fiksitan de l'Organiza Komitato.

#### 2.

La aliĝo al la Kongreso signifas akcepton de tiu ĉi regularo

### II. Celo de la Kongreso.

#### 3.

Celo de la Kongreso estas la esploro de ĉiuj demandoj, komuninteresaj por ĉiuj Esperantistoj, kun escepto de la religiaj, politikaj kaj socialaj demandoj, kiuj ne devas esti tuŝataj en kongresa kunsido<sup>2)</sup>, kaj de la lingvaj demandoj, kies esploro kaj solvo estas rezervitaj al la Lingva Komitato<sup>3)</sup>.

#### 4.

Povas esti priparolataj nur la temoj enskribitaj en la tagordon.

La temoj, akcepteblaj laŭ artikolo 3a, estas senpere metataj en la tagordon, se ilia esploro ne postulas specialistan kompetentecon.

La temoj, kies priparolado postulas tian kompetentecon, estas metataj en la tagordon nur post esploro en specialista sekcio. (Vidu 13a.)

1) Bulonja Deklaracio pri Esperantismo, 1905 (Esperantista Dokumentaro, kajero 1a, paĝo 32).

2) Ĝeneva Deklaracio pri la neŭtraleco de la Kongresoj de Esperanto, 1906 (Esperantista Dokumentaro, kajero 4a, paĝoj 12 kaj 31).

3) Fondita de la Bulonja Kongreso (Esperantista Dokumentaro kajero 1a, paĝoj 19 kaj 21).

## 5.

Ĉar la Kongreso ne konsistas el rajtigitaj delegitoj, ĝi povas esprimi dezirojn kaj konsilojn, sed neniel alpreni decidojn devigajn, ĉu por izolaj Esperantistoj, ĉu por la esperantistaj societoj.<sup>1)</sup>

III. Konstanta Kongresa Komitato<sup>2)</sup>.

## 6.

La Konstanta Kongresa Komitato konsistas el: Internacia Organiza Komitato, elektita de ĉiu Kongreso, laŭ propono de la Estraro, por prepari la sekvontan Kongreson: krom la elektitaj membroj, ĝi enhavas la prezidintojn de la antaŭaj Kongresoj;

Loka Komitato, starigita kiel delegacio de la Internacia Organiza Komitato;

Ĝenerala Sekretario, elektita de la Kongreso, laŭ propono de la Estraro, por la periodo ĝis la sekvonta Kongreso, kaj reelektebla.

La Ĝenerala Sekretario povas esti helpata de unu aŭ kelkaj sekretarioj, elektitaj, laŭ la propono, de la Internacia Organiza Komitato.

## 7.

La Internacia Organiza Komitato estas komisiita decidi la ĝeneralajn preparojn rilatajn al la Kongreso, nome fiksi la pagotan kotizaĵon, prepari la provizoran tagordon, fari la oficialajn internaciajn klopodojn.

## 8.

La Loka Komitato estas komisiita pri ĉiuj detaloj de la loka organizo.

## 9.

La tasko de la Ĝenerala Sekretario estas: konservi la arĥivojn de la Kongresoj, prepari la laborojn de la Internacia Organiza Komitato kaj plenumi ĝiajn decidojn, prezenti al la Kongreso la dokumentojn kaj raportojn necesajn por ĝiaj laboroj, prepari la protokolon de ĉiu labora kunsido kaj prezenti ĝin al la

<sup>1)</sup> Tiu ĉi paragrafo estas nuligita per la ĉi-sube presita aldono akceptita de la 7a Kongreso.

<sup>2)</sup> Esperantista Dokumentaro, kajero 4a, paĝoj 23 kaj 50.

posta kunsido, publikigi la protokolaron kaj oficialajn dokumentojn de la Kongreso, por kies presado la Kongresa Kaso posedas la necesan monon; plenumi la Kongresajn decidojn, kiel ekzemple komuniki ĝiajn dezirojn al la koncernaj personoj, nome al la registaroj.

#### **IV. Kongresa Estraro<sup>1)</sup>.**

##### **10.**

La Kongresa Estraro konsistas, krom la honoraj prezidantoj kaj membroj, el:

La Kondukanta Estraro, por la laboraj kunsidoj;

La Naciaj Delegitoj, por la solenaj kunsidoj kaj festoj.

##### **11.**

La Kondukanta Estraro konsistas el:

Unu Prezidanto kaj almenaŭ unu Vicprezidanto el la lando, kie sidas la Kongreso;

Kell aj aliaj Vicprezidantoj, laŭprincipe el la nacioj plej grandanombre reprezentataj en la Kongreso;

La Ĝenerala Sekretario;

Sekretarioj, nome a) la Sekretarioj de la Ĝenerala Sekretariejo, b) la Sekretarioj de la Loka Komitato.

La Prezidanto kaj la Vicprezidantoj estas elektitaj de la Kongreso, laŭ propono de la Kongresa Konstanta Komitato.

##### **12.**

La Naciaj Delegitoj estas:

Unu Delegito kaj laŭvole unu anstataŭanto el ĉiu regno, kies regnanoj ĉeestas la Kongreson;

Unu Delegito kaj laŭvole unu anstataŭanto, por ĉiu lingvo parolata en tiu regno, krom la oficiala lingvo, kondiĉe, ke reprezentantoj de la dirita lingvo ĉeestas la Kongreson.

Tiuj Delegitoj estas elektitaj, en preparaj kunsidoj, antaŭ la unua kongresa kunsido, de la kongresanoj, kiujn ili reprezentos.

---

<sup>1)</sup> Esperantista Dokumentaro, kajero 4 a, paĝoj 12 kaj 39.

## V. Specialaj sekcioj.

13.

Por la esploro de ĉiuj specialaj aŭ teknikaj temoj aŭ eĉ de la temoj rezervitaj pro la kongresa neŭtral-eco (3.), oni povas formi specialistajn studajn Sekciojn.

Tiuj Sekcioj konsistas, ĉu el specialistaj societoj, antaŭe organizitaj, kaj decidintaj kunveni dum la Kongreso, ĉu el personoj, kiuj grupiĝas libere dum la Kongreso, por esplori kune temojn, pri kiuj ili havas specialistan kompetentecon aŭ interesiĝas speciale.

14.

La Sekcioj povas peti, ke la deziroj, kiujn ili esprimis, aŭ la konkludoj de iliaj raportoj, estu prezentataj al la Kongreso.

La Kondukanta Estraro decidas, ĉu tiu prezento estas farebla laŭ la ĝeneralaj principoj, kiuj regas la Kongreson.

## VI. Kongresaj konsiliĝoj.

15.

La Kongreso pridiskutas:

- a) La temojn senpere metitajn, de la Internacia Organiza Komitato, en la tagordon;
- b) La dezirojn kaj konkludojn de la Sekcioj, prezentitajn de la Kondukanta Estraro.

16.

Neniu oratoro povas paroli pri unu sama temo dum pli ol dek minutoj.

17.

Pri la temoj senpere metitaj en la tagordon, projekto de deziro aŭ de konsilo, redaktita de la Kondukanta Estraro, povas esti prezentata al la Kongresa voĉdonado.

Se la Kongreso opinias, ke la proponita teksto bezonas ŝanĝojn pli gravajn ol la redaktaj plibonigoj fareblaj dum la kunsido mem, la Kondukanta Estraro estas komisiata redakti novan tekston.

18.

Kiam deziro aŭ konkludo de Sekcio estas prezentita al la Kongreso, ĉi tiu povas pridiskuti la konvenon, alpreni ĝin kiel kongresan deziron aŭ konkludon, ne rekomencante la teknikan diskuton, antaŭe faritan de la specialistoj.

En nenia okazo tia teksto povas esti ŝanĝata de la Kongreso; se ĝi ne estas akceptata, ĝi estas resendata al la Sekcio.

Tiu lasta povas ĝin ŝanĝi, laŭ la direkto montrita de la Kongresa konsiliĝo, kaj ĝin prezentigi denove. Se la tempo mankas por tio, la afero estas prokrastata ĝis la sekvonta Kongreso.

\* \* \*

## **Aldono al la regularo de la kongresoj.**

1. Ĉiu decido de Internacia Esperantista Kongreso estas deviga nur por la Oficialaj Esperantistaj Institucioj, t. e. la institucioj kreitaj kaj subtenataj, laŭ deziroj de Internaciaj Esperantistaj Kongresoj, aŭ decidoj de la Rajtigataj Delegitoj. Por la esperantistoj privataj, ĝi havas valoron nur moralan, montrante al ili la deziron aŭ opinion de la plimulto.

2. Partopreni en la Kongreso kaj en ĝiaj diskutoj havas la rajton ĉiu, kiu pagis la kotizaĵon kaj submetiĝis al la Kongresa Regularo, sed rajton de voĉdonado havas nur la regule elektitaj Delegitoj de Esperantistaj grupoj aŭ societoj.

3. Kiel Delegito estas rigardata ĉiu persono, kiu prezentas al la kongresa komitato rajtigan leteron, kiun, en la nomo de la grupo aŭ societo, subskribis ĝia prezidanto, konigante samtempe la nombron de la membroj de tiu grupo aŭ societo.

4. Ĉiu loka, regiona aŭ landa grupo aŭ societo de propagando povas elekti po unu delegito por ĉiuj 25 membroj. Malgrandaj grupoj povas, por elekto de delegito, kuniĝi kun aliaj grupoj.

5. Ĉiu grupo povas elekti siajn Delegitojn, aŭ inter siaj propraj membroj aŭ inter aliaj Esperantistoj, kiuj partoprenos en la Kongreso. Ĉiu Delegito havas

tiom da voĉoj, kiomfoje po 25 anoj havas la grupo aŭ societo, kiun li reprezentas.

6. La tagordon de la Kongreso fiksas la Prezidanto de la Konstanta Kongresa Komitato, post interkonsiliĝo kun la aliaj anoj de tiu Komitato, kaj li publikigas ĝin tri monatojn antaŭ la kongreso, en Oficiala Gazeto, por ke ĉiuj societoj kaj grupoj havu ĉa eblecon esprimi al siaj delegitoj sian opinion pri la diskutotaj demandoj.

Se ia propono ne estas akceptita en la tagordo, ĝia aŭtoro povas ricevi de la Kongresa Estraro la rajton, disdoni ĝin dum la kongreso al la Delegitoj de la Kongreso, kaj se ne malpli ol 100 Delegitoj subskribis ĝin kiel diskutindan, la Kongresa Komitato devas enporti ĝin en la tagordon.

7. En ĉiu grupo aŭ societo, estas konsiderata kiel elektanta membro ĉiu ano de la grupo aŭ societo, kiu pagis jaran kotizaĵon al la Centra Oficejo, difinitan de la Administra Komitato de la Centra Oficejo.

---

## **La Universalaj Kongresoj de Esperanto.**

**Ia Kongreso en Boulogne-sur-Mer (Francujo), 5 ĝis 13a de Aŭgusto 1905.** (La kongreso kreis provizoran Lingvan Komitaton kaj provizoran Organizan Komitaton kaj unuanime konsentis kaj akceptis la „Deklaracion pri Esperantismo“<sup>1)</sup>. Dro Zamenhof ricevis la Krucon de l'Honora Legio; ĉeestis ĉirkaŭ 800 personoj.)

**IIa Kongreso en Genève (Svisujo), 27an de Aŭgusto ĝis 5a de Septembro 1906.** (La kongreso definitive elektis la Lingvan kaj Organizan Komitatojn kaj priparolis propagandajn aferojn; krom la agadaj kunsidoj okazis fakaj kunvenoj kaj diservoj; partoprenis pli ol 1200 samideanoj.)

**IIIa Kongreso en Cambridge (Britujo), 12 ĝis 17a de Aŭgusto 1907.** (La kongreso rekomendis fondi Esperantajn Oficejojn; René de Saussure pro-

---

<sup>1)</sup> Vidu paĝon 65.

ponis internacian helpan monsystemon (Sm, Sd); okazis multaj fakaj kunvenoj; la urbestro kaj la universitato helpis afable la kongreson; unu ŝtato (Belgujo) sendis oficialan reprezentanton; la nombro de la vizitintoj superis 1300. Dro Zamenhof kaj aliaj gekongresanoj estis akceptataj en la „Guildhall“ en London.)

**IVa Kongreso en Dresden (Germanujo), 16 ĝis 22a de Aŭgusto 1908.** (La reĝo Frederiko Aŭgusto estis protektanto de la kongreso; la urbo Dresden apogis la kongreson per monhelpo; la kongreso dankis la Lingvan Komitaton kaj la Akademion pro ilia fideleco al la Fundamento kaj rifuzis ĉiujn proponojn pri lingvaj ŝanĝoj; oficiale reprezentataj estis 3 ŝtatoj; 1500 personoj el 40 nacioj partoprenis; en la reĝa operdomo, kiun afable disponigis la Saksa reĝo, oni prezentis la verkon de Goethe „Ifigenio en Taŭrido“; profesiaj aktoroj ludis sub la direktado de Emanuel Reicher.)

**Va Kongreso en Barcelona (Hispanujo), 5 ĝis 11a de Septembro 1909.** (La hispana reĝo estis protektanto; okazis la fame konataj „Floraj Ludoj“; oni priparolis la kreon de „Internacia Konsilantaro“; pluraj ŝtatoj sendis oficialajn reprezentantojn; la nombro de la kongresanoj estis ĉirkaŭ 1300).

**VIa Kongreso en Washington (Usono), 14 ĝis 20a de Aŭgusto 1910.** (16 registaroj sendis oficialajn delegitojn; la kongreso varme rekomendis la abonon de la „Oficiala Gazeto“; „Internacia Konsilantaro“ estis definitive kreata; ĉeestis 357 esperantistoj.)

**VIIa Kongreso en Antwerpen (Belgujo), 20 ĝis 27a de Aŭgusto 1911.** (Ĉeestis preskaŭ 1800 samideanoj; multaj registaroj kaj famaj societoj sendis oficialajn delegitojn, Usono eĉ kelkajn; la hispana reĝo nomis Dron Zamenhof Oficiro de Izabela la Katolika; kunvenis la anoj de la Internacia Konsilantaro; oni akceptis regularon pri Rajtigitaj Delegitoj<sup>1)</sup> kaj elektis komision por studi la demandon pri internacia organizado de la Esperantistaro; ĉiuj decidoj

<sup>1)</sup> Vidu paĝon 81.

de la antaŭaj kongresoj estis unuanime akceptataj de la Rajtigataj Delegitoj.)

VIIIa Kongreso okazos en Krakow (Galicio) en la jaro 1912.

IXa Kongreso okazos en Genova (Italujo) en la jaro 1913.

Xa Kongreso okazos en Paris (Francujo) en la jaro 1914.

---

## Kongresoj, kiuj aprobis aŭ akceptis Esperanton.

**Akuŝistinoj.** Kongreso en Dresden 1908 aprobis Esperanton.  
**Antialkoholitoj.** Kongreso en Stockholm 1907: oni proponis Esperanton kiel kongresan lingvon.

**Aŭtomobilistoj.** Kongreso en Paris 1903 aprobis Esperanton.

**Blinduloj.** La kongreso en Napoli 1909 proponas, enkonduki Esperanton en la lernejojn de la blinduloj.

**Dentistoj.** La kongresoj Genève 1906, Bruxelles 1908, Berlin 1909 tute aprobis Esperanton.

**Framasonoj.** La framasona centra oficejo en Bern korespondas esperante.

**Fotografistoj.** La kongreso en Bruxelles 1910 aprobis Esperanton kiel kongreslingvon.

**Internaciaj Socletoj,** Bruxelles. La oficejo akceptis oficialo Esperanton.

**Instruistoj.** La kongreso en Liège 1905 aprobis Esperanton.

**Katolikoj.** 1910 (Paris) kaj 1911 (Haag) okazis katolikaj kongresoj, en kiuj oni nur parolis Esperante.

**Komercistoj.** Societo por komerca instruado presigis prospekt-ojn esperante.

**Kuracistoj.** Dum la kongreso 1908 en Budapest okazis tri referatoj en esperanta lingvo; la kongreso 1909 en Rio de Janeiro rekomendis Esperanton.

**Mislistoj** en Hindujo aprobis Esperanton.

**Muzikistoj.** La kongreso en Milano 1906 akceptis Esperanton.

**Pentristoj.** La kongresoj en Grenoble 1904 kaj St. Quentin 1905 aprobis Esperanton.

**Novmalteslanoj** aprobas kaj uzas Esperanton.

**Pacifistoj** permesas Esperanton kiel kongreslingvon.

**Pentristoj.** La kongresoj en Grenoble 1904 kaj St. Quentin 1905 aprobis Esperanton.

**Psikologoj** akceptis 1909 en Genève esperantajn referatojn.

**Stenografistoj** en Rouen 1909 kaj Kjöbenhavn 1911 aprobis Esperanton.


Multaj aliaj kongresoj tre afable pritraktis la demándon pri lingvo Internacia, sed ĝis nun ne definitive decidis pri ĝi.



## La progresoj de Esperanto.

La Esperanto-movado ĉiutage senhalte kreskas; tio estas fakto nerefutebla. En la jaro 1889 ekzistis nur 29 libroj esperantaj, en 1894 nur 88 kaj en 1899 nur 123 libroj; post kvin jaroj, en 1904 ni havis 211 librojn; ĝis la jaro 1909 la nombro treege pligrandiĝis: 1330 libroj, kaj hodiaŭ, en Decembro 1911, ĉe pli ol 1500 libroj esperantaj ekzistas. Pri tiu ĉi tre rimarkinda literaturo miras ĉiu neesperantisto aŭ skeptikulo, ĉar ĝi montras pli ol multaj vortoj la nemortigeblan vivon de Esperanto.

### Kreskado de Esperanto en la jaroj 1901—1910.



Rapide kreskis en la lastaj kvin jaroj la nombro de la propagandaj societoj kaj grupoj. Laŭ statistiko de la Centra Oficejo Esperanto progresis tiamaniere:

En la jaro 1888:	1 grupo	en la jaro 1900:	26 grupoj
„ „ „ 1889:	3 grupoj	„ „ „ 1901:	26 „
„ „ „ 1890:	3 „	„ „ „ 1902:	44 „
„ „ „ 1891:	7 „	„ „ „ 1903:	113 „
„ „ „ 1892:	13 „	„ „ „ 1904:	186 „
„ „ „ 1893:	15 „	„ „ „ 1905:	308 „
„ „ „ 1894:	19 „	„ „ „ 1906:	474 „
„ „ „ 1895:	18 „	„ „ „ 1907:	721 „
„ „ „ 1896:	24 „	„ „ „ 1908:	1266 „
„ „ „ 1897:	30 „	„ „ „ 1909:	1447 „
„ „ „ 1898:	37 „	„ „ „ 1910:	1719 „
„ „ „ 1899:	32 „	„ „ „ 1911:	2016 „

La dua parto de nia Poŝkalendaro, la „Adresaro“, verŝajne aperonta en Aprilo 1912, enhavos liston de ĉiuj societoj kaj grupoj de la jaro 1911. Por ke ni povu presigi kiel eble plej precizan liston, ni insiste petas ĉiujn grupojn kaj asociojn, tuj kiam la nova estraro por la jaro 1912 estos elektita, sendi poŝtkarton — ne leteron, por ke la statistika laboro fariĝu pli facila — kun la dezirindaj informoj laŭ la jena modelo:

**Urbo:**

**Lando:**

**Nomo de la grupo:**

**Prezidanto:**

Al kiu oni devas adresi  
sendaĵojn por la grupo? }  
(Adreso!)

**Nombro de la grupanoj:**

La poŝtkartojn kun precizaj informoj, legeble skribitajn, oni sendu al **Dro Schramm, Dresden, Ständehaus (Germanujo).**

Estas tute necese, ke ĉiu grupo aŭ asocio plenumu tiun ĉi peton, ĉar estas honora devo de ĉiu grupo kunhelpi, por ke ni havu fidindan kaj precizan statistikon kaj adresaron por 1912.

## Lederer-Fondo.

Profesoro Dro Lederer mortis; ne plu estas tiu ĉi viro, kiu faris al la esperantistaro, precipe al la germanaj samideanoj, neforgeseblajn, valorajn servojn por la bono de nia afero. Por ke lia nomo daŭru eterne inter la esperantistaro, kelkaj intimaj amikoj de la mortinto decidis aranĝi „Lederer-Fondon“. La celo de tiu ĉi fondo estu: doni monpremiojn al la plej bonaj tradukintoj de kiu ajn nacia literaturajo. Administranto de la fondo estos laŭ ministra permeso la Saksa Esperanto-Instituto en Dresden. Ni petas ĉiujn esperantistojn, kiuj ŝatis nian neforgeseblan amikon Lederer, kaj ĉiujn grupojn, kiujn li apogis kaj helpis, sendi mondonacojn por la Lederer-Fondo, por ke la fondo baldaŭ fariĝu kiel eble plej riĉa. Eĉ la plej malgrandajn sumojn ni danke akceptas. Esperantistoj montru, ke vi honoras viajn senlacajn antaŭbatalantojn; montru, ke vi estas eterne dankaj, kaj sendu ion por la fondo!

En la nomo de kelkaj amikoj de Siegfried Lederer:  
Dro Schramm, reĝa asesoro,  
Dresden, Ständehaus (Germanujo).

## Internacia Muzeo.

Internacia muzeo estas fondita en Bruxelles de la Monda Kongreso de la Internaciaj Asocioj en la monato Majo de la jaro 1910. Ĝi estas fondaĵo de la grupiĝo de Asocioj kaj Kongresoj, kun la kunhelpo de administraj, sciencaj, artaj, ekonomiaj kaj socialaj institutoj. La materia administrado de la Muzeo estis konfidata al la Centra Oficejo de la Internaciaj Asocioj. Tiu ĉi oficejo havas la celon, krei/konstantajn rilatojn inter la Asocioj kaj agi, kiel plenumanta organo

de la Monda Kongreso. La Muzeo, kies sidejo estas: Palais du Cinquantenaire, Bruxelles, intencas grupigi internaciajn kaj komparajn kolektojn de objektoj difinitaj por ilustrado kaj elmontrado de sciencoj, artoj, administrado, sociala ekonomio, tekniko, industrio kaj komerco. La kolektoj de la Muzeo kaj la servoj de la Oficejo estas en rilato kun la servo de Dokumentado de la Internacia Instituto de Bibliografio. Por Esperanto estas aranĝita speciala fako. La verkojn kaj objektojn, kiujn oni deziras lokigi en tiu ĉi fako de la Internacia Muzeo, oni bonvolu sendi, po du ekzempleroj, al la Esperantista Centra Oficejo, 51, rue de Clichy, Paris.

## Esperantista Muzeo kaj Biblioteko.

En Dresdeno, la urbo de la Kvara, ni nun havas oficialan bibliotekon kaj muzeon de Esperanto, apartenantan al la reĝa saksa ŝtato. Estas tre ĝojige, ke ni nun havas ŝtatan bibliotekon kaj muzeon, kiu ne nur montras esperantaĵojn, sed ankaŭ pruntedonas la librojn ne nur al samurbanoj, sed ankaŭ al samlandanoj, eĉ eksterlandanoj. Certe tre grava institucio por tuta Esperantujo! Kaj laŭ nia opinio institucio, kiun ni esperantistoj devas apogi ĉiamaniere.

Do, karaj gesamideanoj, se vi havas ion superfluan, ne forĵetu ĝin, ankaŭ se ĝi eĉ nur estas esperantista regularo aŭ propagandilo, sed sendu ĝin al tiu ĉi biblioteko! Kaj vi verkistoj, kiuj vi skribas librojn, verkojn kaj verketojn, ne forgesu sendi unu ekzempleron al tiu ĉi muzeo, por ke tiu ĉi reĝa kolekto fariĝu honora monumento de nia movado! Ĉion oni sendu sub la adreso: Reĝa Biblioteko, Dresden, Ständehaus, I. etaĝo, ĉambro 83.

## Ĉekbanko Esperantista.

La Ĉekbanko Esperantista (adreso: Merton Abbey, London, S.W.) celas unue la faciligon de la pagoj inter la diversnaciaj esperantistoj kaj

komercistoj, kaj due, prepari la vojon por la ĝenerala akcepto kaj enkonduko de internacia monunuoj.

La Regularo estas la jena:

1. Ĉiu persono aŭ firmo konata de la bankoficistoj aŭ doninta almenaŭ du kontentigajn referencojn povas malfermi ĉekkonton ĉe la banko, pagante en sian krediton minimuman sumon de 10 spesmiloj.

2. Bankbiletoj de ĉiuj landoj estas akceptataj laŭ la efektiva borsa kursvaloro en la tago de sia alveno en London.

3. La rezultanta brita funtvaloro estos transformata en la internacian monunuon laŭ la kurso de 2,003 ŝilingoj por ĉiu spesmilo.

4. Post la alveno de iu mensendo la banko per poŝtkarto tuj informos la sendinton pri ĝia ĝusta ricevo kaj pri la preciza spesmila ekvivalento metita en lian krediton.

5. Oni povas malfermi du specojn de kontoj:

a) **Ordinara Tirkonto.** 2% da interezo\*) estas pagata por la minimuma monata kredito-saldo. (Ekzemplo, se la minimuma monata saldo estus ĉirkaŭe 1000 Sm, la interezo kreditota por la jaro estus 20 Sm.)

b) **Depona Konto.** 2½% da interezo estas pagata komence de la lasta tago de l' monato, en kiu la depono estas farita.

La interezo ĉesas fine de la monato antaŭironta la daton de l' fortiro de la deponaĵo.

6. La interezo estas alskribata en la konton ĉiujare la 31an de Decembro.

7. Se iu konthavanto deziras eltiri la monon, kiu estas en lia kredito, li povas tion fari ĉia-tempe, laŭ bezono parte aŭ tute, kaj ne avertante la bankon, per spesmita ĉeko aŭ transpagilo.

8. La mono metala elpagota de la banko kontraŭ ĉekoj kaj transpagiloj prezentotaj estas la brita ora

\*) Proponita vorto por signifi procentaĵon de kapitalo (angle: interest; france: intérêt; germane: Zinsen).

funto. La cifera sinteza komparilo on la kalkuloj kaj kontoj, tamen, estos la spesmilo.

9. P a g o p e r ĉ e k o. La ĉekoj elmontras la sumon en spesmiloj, sed estas rekomendinde, ankaŭ enmeti, en spacon por tio rezervitan, la ekvivalenton de la spesmiloj en brita funtvaloro (1 spesmilo = 2,003 ŝilingoj), ĉar la komercistoj kaj naciaj bankoj, tra kies manoj la ĉekoj pasas, ĉiam volonte aĉetas kaj vendas kambiojn kaj ĉekojn en fremda nacia mono pagotajn, dum nura spesmila ĉeko ankoraŭ estas komerce malfacile negocebla kaj pro tio ne ŝatata kaj eble rifuzota de la bankistoj.

Estas ankaŭ rekomendinde eltiri en tia okazo per ĉeko sumojn ne tro malgrandajn.

Tiaj ĉekoj, kiuj konformiĝas al la brita leĝaro kaj pro tio portas unu pencan stampon, estos traktataj same kiel ordinaraĵ britaj ĉekoj kaj ili taŭgas por pagi en brita mono fakturojn de britaj komercistoj kaj, ĝenerale, ŝuldojn en Britujo.

Oni povus, kompreneble, ankaŭ uzi la ĉekojn tute same kiel britan ĉekon, enskribante per angla lingvo nur la funtan sumon.

10. P a g o p e r t r a n s p a g i l o. La transpagiloj elmontras la sumon nur en spesmiloj kaj ili nur taŭgas por pago de unu konthavanto al alia, tamen oni povas pagi per ili eĉ la plej malgrandajn sumojn, kiel ekz. la koston de gramatiko, abonon de ĵurnalo, ŝlosilojn aŭ aliajn propagandilojn. Ĉiuj konthavantoj, firmoj aŭ privatuloj, akceptas ilin plenvalore.

Transpagiloj devas esti sendataj ne al ni, sed al la pagotuloj en ili nomitaj. Ili ne bezonas esti stampataj per unupenca marko.

Nomaro de la klientaro estas laŭbezone publikigata kaj inter ili dissendota.

11. Konthavantoj, ĉe kiuj niaj ĉekoj kaj transpagiloj kutimas kolektiĝi, estas petataj, sendi ilin laŭbezone al la ĉekbanko, por ke ni kreditu la tutan sumon en la propran konton. Ili povas ĉiam disponi pri la mono kreditita per negocado de ĉeko ĉe sia propra loka banko, kiu traktos ĝin same kiel britan ĉekon, aŭ petante nin sendi ĉekon en la

nacia mono de la konthavanto enkasigeblan ĉe loka nacia banko.

La konthavantoj post malfermo de konto ricevos afrankite po unu kajero de 25 stampitaj ĉekoj (1 Sm 100 s.) kaj de 25 transpagiloj (0 Sm 100 s.).

La kosto 1 Sm 200 s. estas metata en ilian ŝuldon.

12. La kontoj aŭtomate fermiĝas per la fortiro de la tuta kredita ŝuldo.

## Kursaro

de la ĉefaj naciaj monunuoj en francaj frankoj kaj spesmiloj, 1. 7. 1911.

Por ricevi la ekvivalenton de unu spesmilo en la nacia mono laŭ la hodiaŭa kurso, dividu 2.5259 per la franka valoro de la reciproka lando, tiamaniere:

Portugalujo, 2.5259  $4.96 = 0.\$503$ .

				Frs.	Sm.
Argentino	1 peso	=	100 centavos	= 5.10	= 2.019
Aŭstrio	1 krone	=	100 heller	= 1.05	= 0.416
Bolivio	1 boliviano	=	100 centavos	= 2.15	= 0.851
Brazillo .	1 milreis	=	1000 reis	= 1.60	= 0.633
Ĉilio . . .	1 peso	=	100 centavos	= 1.17	= 0.463
Finnlando	1 markka	=	100 penniä	= 1.00	= 0.396
Francujo	1 franc	=	100 centimes	= 1.00	= 0.396
Germanujo	1 mark	=	100 pfennig	= 1.23	= 0.487
Gr. Britujo	1 shilling	=	12 pence	= 1.26	= 0.499
Hispanujo	1 peseta	=	100 centimos	= 0.93	= 0.368
Hungarujo .	1 korona	=	100 fillér	= 1.05	= 0.416
Holando	1 gulden	=	100 cents	= 2.09	= 0.827
Indio . . .	1 rupee	=	16 annas	= 1.60	= 0.633
Japanujo	1 yen	=	100 sen	= 2.55	= 1.010
Kanado	1 dollar	=	100 cents	= 5.20	= 2.059
Meksiko	1 peso	=	100 centavos	= 2.60	= 1.029
Paraguajo .	1 peso	=	100 centavos	= 0.45	= 0.178
Peruo . . .	1 sol	=	100 centavos	= 2.50	= 0.990
Portugalujo	1 milreis	=	1000 reis	= 5.10	= 2.019
Rusujo	1 rubl	=	100 kopiejki	= 2.70	= 1.069
Svedujo	1 krona	=	100 öre	= 1.38	= 0.546
Turkujo . . .	10 piastres	=	400 para	= 2.27	= 0.899
Unuig. Ŝtatoj .	1 dollar	=	100 cents	= 5.20	= 2.059
Uruguajo	1 peso	=	100 centavos	= 5.40	= 2.138
Venezuelo .	1 bolivar	=	100 centavos	= 1.00	= 0.396

Belgujo, Bulgarujo (100 stotinki), Grekujo (100 lepka), Italujo, Rumanujo (100 bani), Serbujo (100 para), Svisujo same kiel Francujo. Danujo, Norvegujo same kiel Svedujo.

**Internacia Mona Tabelo**  
(por aliformigi internacian monvaloron en nacian).

	1 spesmilo = 100 spesdekoj = 1000 spesoj	frankoj	Granda Britujo ŝilingoj kun decimaloj	German- ujo markoj	U. Ŝ. A. dolaroj	Rusujo rubloj	Skand- dinavia Unuiĝo kronoj	Atstrujo- Hungarujo kronoj	Portugal- ujo milrejsoj	Holando florenoj
1	2,53	2,—	2,05	0,49	0,95	1,82	2,40	0,451	1,21	
10	25,25	20,03	20,46	4,88	9,47	18,19	24,05	4,510	12,10	
20	50,52	40,06	40,92	9,75	18,94	36,38	48,10	9,021	24,20	
30	75,78	60,09	61,38	14,62	28,41	54,56	72,16	13,532	36,30	
40	101,03	80,12	81,84	19,49	37,88	72,75	96,21	18,042	48,40	
50	126,30	100,15	102,30	24,37	47,35	90,94	120,26	22,553	60,50	
60	151,55	120,18	122,76	29,24	56,82	109,13	144,32	27,063	72,60	
70	176,81	140,21	143,22	34,12	66,29	127,31	168,37	31,574	84,70	
80	202,07	160,24	163,68	38,99	75,76	145,50	192,42	36,084	96,80	
90	227,33	180,27	184,14	43,86	85,23	163,70	216,48	40,595	108,90	
100	252,59	200,30	204,60	48,74	94,72	181,88	240,53	45,106	121,25	



## Naciaj tabeloj

(por aliformigi naciajn monvalorojn en internacian).

### Latina Unuiĝo

1 franko = 100 centimoj

frankoj	spesniloj
1	0,40
10	3,96
20	7,92
30	11,88
40	15,84
50	19,80
60	23,76
70	27,72
80	31,68
90	35,64
100	39,59

### U. Ŝ. A.

1 dolaro = 100 cendoj

dolaroj	spesniloj
1	2,05
10	20,52
20	41,04
30	61,56
40	82,07
50	102,59
60	123,11
70	143,62
80	164,14
90	184,66
100	205,18

### Germanujo

1 marko = 100 pfenigoj

markoj	spesniloj
1	0,49
10	4,89
20	9,78
30	14,67
40	19,55
50	24,44
60	29,33
70	34,21
80	39,12
90	44,01
100	48,88

### Rusujo

1 rublo = 100 kopekoj

rubloj	spesniloj
1	1,06
10	10,56
20	21,12
30	31,68
40	42,24
50	52,79
60	63,35
70	73,91
80	84,47
90	95,02
100	105,58

**Skandinavia Unuiĝo**

1 krono = 100 oeroj

kronoj	spesniloj
1	0,55
10	5,50
20	11,00
30	16,49
40	22,00
50	27,49
60	33,00
70	38,49
80	44,00
90	49,48
100	54,98

**Portugalujo**

1 milrejsa = 1000 rejsoj

milrejsoj	spesniloj
1	2,22
10	22,17
20	44,34
30	66,51
40	88,68
50	110,85
60	133,02
70	155,19
80	177,36
90	199,53
100	221,70

**Aŭstrujo-Hungarujo**

1 krono = 100 heleroj

kronoj	spesniloj
1	0,415
10	4,16
20	8,31
30	12,47
40	16,63
50	20,79
60	24,94
70	29,10
80	33,26
90	37,42
100	41,57

**Holando**

1 florenso = 100 censoj

florensoj	spesniloj
1	0,825
10	8,25
20	16,49
30	24,74
40	33,00
50	41,24
60	49,48
70	57,73
80	66,00
90	74,23
100	82,47

**Granda Britujo**

1 funto = 20 ŝilingoj, 1 ŝilingo = 12 pencoj

pencoj	spesdekoj	ŝilingoj	spesmiloj	funtoj	spesmiloj
1	4	1	0,50	1	9,99
2	8 <sup>1</sup> / <sub>4</sub>	2	1,00	2	19,97
3	12 <sup>1</sup> / <sub>2</sub>	3	1,50	3	29,95
4	16 <sup>1</sup> / <sub>2</sub>	4	2,00	4	39,94
5	20 <sup>3</sup> / <sub>4</sub>	5	2,50	5	49,92
6	25	6	3,00	6	59,91
7	29	7	3,50	7	69,90
8	33 <sup>1</sup> / <sub>4</sub>	8	4,00	8	79,88
9	37 <sup>1</sup> / <sub>2</sub>	9	4,50	9	89,86
10	41 <sup>1</sup> / <sub>2</sub>	10	4,99	10	99,85
11	45 <sup>3</sup> / <sub>4</sub>	(1funto)20	9,99		
